Umberto Broccatelli,

# Eŭropa himno

Kantu kune, amikaro,
ni la ĝojon festas nur,
nek rivero, nek montaro
plu landlimoj estas nun.

Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid',
nun brilegu belo via,
ĉiu estu via id'.

Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
Via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.

De l' Malnova Kontinento,
ĵus ekstaris la popol',
gvidas ĝin tre nova sento,
kaj kuniga forta vol'.

Sub la ŝildo de la juro,
ni vivados en konkord'.
Tio estas nia ĵuro:
unu land' kaj unu sort'.

Jen ekzemplo por la mondo,
jen direkto, jen la voj'.
Tuthomaro granda rondo,
en la paco, en la ĝoj'.

. . .

Umberto Broccatelli,

# Europa-Hymne

*tradukita de Rudolf-Josef Fischer*

Singt gemeinsam, Freundesscharen,
feiern wir die Freude nur,
weder Flüsse noch Gebirge
bilden Landesgrenzen noch.

O Europa, uns're Heimat,
allzu lang warst du geteilt.
Nun erstrahle deine Schönheit,
jeder von uns ist dein Spross.

Deine Fahne nun verschwistert
Menschen nach der Kriegeszeit.
Dein Gesetz vereint jetzt alle
Bürger in Verständigung.

Überall im alten Erdteil
standen just die Völker auf.
Treibt sie doch ein neues Fühlen
und der Ein'gung fester Will'.

Unterm Schild des Rechtes leben
künftig wir in Eintracht fort.
Denn so lauten uns're Schwüre:
einig Zukunft, einig Land.

Geben wir der Welt ein Vorbild:
hier die Richtung, hier der Weg:
aller Menschheit große Runde
nur im Frieden und in Freud'.

. . .

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Umberto Broccatelli *(∗1931-03-05 – †2010-02-11).*

*Arg-900-1795 (2015-02-25 15:02:33)*

*Pluraj versioj de la poemo "Odo al la ĝojo" estas legeblaj en* http://www.poezio.net/version?poem-id=133&version-id=889,264&order=title*. Legu ankaŭ:* http://eo.wikipedia.org/wiki/Odo_al_ДЁojo*.*
*La muziknotoj, laŭ kiuj estas kanteblaj la kanto troviĝas interalie en* http://www.cvnrw.de/download/sing-mit/noten/Ode-an-die-Freude.pdf*.*
*La origina germans teksto de Friedrich Schiller troveblas ankaŭ en* http://ingeb.org/Lieder/freudesc.html*. Tie aŭdeblas ankaŭ la melodio. Pri la verkinto vidu la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Umberto_Broccatelli*.*

*Traduko de la Esperanta poemo "Eŭropa himno" de* Umberto Broccatelli *(∗1931-03-05 – †2010-02-11) en la Germanan de Rudolf-Josef Fischer.*

*Arg-900-1796 (2013-06-09 07:58:54)*

*Pri la tradukinto Dr. Rudolf-Josef Fischer vidu la retejon* http://www.rudolf-josef-fischer.de/*. La himno estas kantebla laŭ la ĉeftemo de la 9-a simfonio de Betoveno (Ludwig van Beethoven), laŭ kiu estas kantebla ankaŭ la poemo "Ode an die Freude" verkita de la germana poeto Friedrich Schiller. Vidu ankaŭ la retejojn* http://eo.wikipedia.org/wiki/9-a_simfonio_(Beethoven)*,* http://eo.wikipedia.org/wiki/Odo_al_ДЁojo *kaj* http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Schiller*.*